WIKIPEDIA

Platgermana lingvo

La platgermana lingvo (ankaŭ nomata ***malaltsaksa*** aŭ ***platdiĉa lingvo***) estas grupo de ĝermanaj dialektoj parolataj de ĉirkaŭ 5 milionoj da homoj en nordo de Germanio, Nederlando kaj Danio. Ĝia ISO-kodo estas *nds*. Ekzistas Vikipedio en la platdiĉa lingvo kaj en la nederlanda malaltsaksa dialekto.

Enhavo

Historio
Gramatiko
Vort-provizo
Dialektoj
Specimeno
Popola kanto platgermana
Famaj aŭtoroj de la platgermana
Klasifiko
Vidu ankaŭ
Notoj
Eksteraj ligiloj

Historio

Iam la platgermana estis multe pli grava ol nuntempe: ĝi estis la oficiala lingvo de urboj de la Hansa Ligo, kaj estis komerca interlingvo de Londono ĝis Novgorodo kaj tra la Balta maro. Pro tio, ĝi forte influis la danan, norvegan kaj svedan lingvojn, en kiuj granda parto de la vortaro ĝis hodiaŭ estas platgermandevena.

Ankaŭ en la baltaj landoj senteblas la kultura kontakto kun la platgermana lingvo: en Tallinn, la ĉefurbo de Estonio, ekzemple la plej granda turo de la mezepoka urbomuro ankoraŭ hodiaŭ platgermane nomiĝas "Kiek in de Köök" (Rigardo en la kuirejon), ĉar en la urbo oni - se iel la vetero ebligis - subĉiele kuiris en internaj kortoj de la domoj, kaj el la urbomura turo eblis rekte enrigardi la grandajn kaldronojn de la najbaraj domoj.

Platgermana lingvo

Plattdüütsch, Plattdütsch, Plattdüütsk, Plattdütsk, Plattdietsch, Plauttdietsch



Areo de Germanio kaj Nederlando kie la platdiĉa nun parolatas

Parolata en	Germanio (norde) Nederlando Danio
Parolantoj	5 000 000
Denaskaj parolantoj	ĉ. 5 milionoj
Skribo	latina

Lingvistika klasifiko

Hindeŭropa lingvaro

Ĝermanaj lingvoj

Okcidentĝermanaj lingvoj

Malaltgermana

Malaltsaksa

Platdiĉa

Oficiala statuso

Oficiala lingvo en	Oficiale agnoskita kiel regiona lingvo en 8 federaciaj landoj de Germanio. Agnoskita kiel regiona aparta lingvo de la Eŭropa Ĉarto pri Lingvoj
Reguligita de	

Lingvaj kodoj

Lingvaj kodoj	
ISO 639-2	nds

ISO 639-3	nds
SIL	NDS
Glottolog	lowg1239
Angla nomo	Low German
Franca nomo	bas allemand
Vikipedio	

En la litova lingvo, kiu principe alprenas tre malmultajn fremdajn vortojn, multaj slangaj vortoj estas platgermanaj, ekzemple *biški* (platgermane *n bischken* aŭ *n bejten*, iomete), *knopkė* (platgermane *Knopke*, butoneto) aŭ *šnekėti* (platgermane *schnacken* aŭ *snacken*, babili).

El lingvistika vidpunkto, historiaj antaŭŝtupoj de la nuntempa platgermana lingvo estas la malnovsaksa kaj poste mezmalaltgermana lingvoj.

Gramatiko


La areo de la platgermana lingvo

La gramatiko similas al tiu de la nederlanda lingvo, kaj ankaŭ iom al tiu de la altgermana:

La platgermana havas nur tri kazojn; personaj formoj de la verboj estas samaj en singularo kaj pluralo.

Genitivecon donas al substantivoj la finaĵo *-s*: *De Fischer* "La fiŝisto"; *Fischers Huus* "La domo de la fiŝisto".

La verboj apartenas al du grupoj, fortaj kaj malfortaj verboj. La malfortaj formas pasintecon per sufikso, dum la fortaj per vokalŝanĝo ĉe la radiko, aŭ per nura redono de la radiko.

Vort-provizo

La platgermana lingvo havas multajn vortojn de ĝermana origino, sed en formo aparta por la platgermana. Ĝi enhavas multajn vortojn el la altgermana lingvo. Tamen la kernon konsistigas praĝermanaj vortoj parencaj al altgermanaj, nederlandaj ktp, sed kelkaj vortoj estas nur platgermanaj.

Nuntempe la amasa influo de la germana lingvo forte minacas la koheron kaj platgermanecon de la platgermana vortprovizo.

Dialektoj

La platgermana lingvo havas multajn dialektojn kaj normigita formo ankoraŭ preskaŭ ne ekzistas. La aŭtoroj ĝenerale verkis dialekte.

Specimeno

Patro Nia

> Unse Vader in' Himmel !
> Laat hilligt warrn dienen Namen.
> Laat kamen dien Riek.
> Laat warrn dienen Willen so as in'n Himmel,
> so ok op de Eerd.
> Uns' dääglich Brood giff uns vundaag.
> Un vergiff uns unse Schuld,
> as wi di vergeben hebbt,
> de an uns schüllig sünd.

Un laat uns nich versöcht warrn.
Mak uns frie vun dat Böse.
Denn dien is dat Riek un de Kraft un de Herrlichkeit in Ewigkeit.
Amen.

Popola kanto platgermana

Dat du myn Leevsten büst,
Ke vi estas mia plejkarulo
dat du wol weest!
vi tutbone scias.
(*refoje*)
Kum by de Nacht, Kum by de Nacht,
Venu dumnokte, venu dumnokte,
segg wi du heest.
diru kiel vi nomiĝas.
(*refoje*)

Kum du üm Middernacht,
Venu vi meznokte
kum du Klok een!
venu je la unua.
(*refoje*)
Vader slöpt, Möder slöpt,
Paĉjo dormas, panjo dormas,
ik slaap alleen.
mi dormas sole.
(*refoje*)

Klop an de Kamerdör,
Frapu ĉe la ĉambropordo,
faat an de Klink!
premu la tenilon!
(*refoje*)
Vader meent, Moder meent,
Paĉjo pensas, panjo pensas,
dat deit de Wind.
ke tion faras la vento.
(*refoje*)

(*Pri la resto de la nokto silentas la kanto...*)

Famaj aŭtoroj de la platgermana

Fritz Reuter - Klaus Groth - Julius Strinde - Gorch Fock - Oswald Andrae - Wolfgang Sieg

Klasifiko

La platdiĉa estas Hindeŭropa, pli precize ĝermana, parenca al la nederlanda, la germana, la jida kaj, pli fore, la frisa kaj dana lingvoj.

Malaltgermanaj dialektoj

Malaltgermana

- malaltfranka
  - nederlanda [nld (http://www.ethnologue.org/show_language.asp?code=nld)]
    - **Nederlanda**
      - okcidenflandra [vls (http://www.ethnologue.org/show_language.asp?code=vls)]
      - orientflandra
      - zelanda [zea (http://www.ethnologue.org/show_language.asp?code=zea)] Zeeuws ?
      - holanda
      - sud-geldera
      - brabansona
      - limburga [lim (http://www.ethnologue.org/show_language.asp?code=lim)]
      - sudorienta limburga [1]
    - afrikansa [afr (http://www.ethnologue.org/show_language.asp?code=afr)]
- malaltsaksa
  - malaltsaksa de Nederlando
  - orientfrisa
  - vestfala [wep (http://www.ethnologue.org/show_language.asp?code=wep)]
  - ostfala
  - platdiĉa [nds (http://www.ethnologue.org/show_language.asp?code=nds)]
  - aĥterhoeka [act (http://www.ethnologue.org/show_language.asp?code=act)]
  - drenta [drt (http://www.ethnologue.org/show_language.asp?code=drt)]

- groninga [gos (http://www.ethnologue.org/show_language.asp?code=gos)]
- platdiĉa [pdt (http://www.ethnologue.org/show_language.asp?code=pdt)]
- sallanda [sdz (http://www.ethnologue.org/show_language.asp?code=sdz)]
- stelingverfa [stl (http://www.ethnologue.org/show_language.asp?code=stl)]
- tventa [twd (http://www.ethnologue.org/show_language.asp?code=twd)]
- veluva [vel (http://www.ethnologue.org/show_language.asp?code=vel)]
- orienta malaltgermana
  - meklenburga-pomera
  - brandenburga
  - malaltprusa

Vidu ankaŭ

- Plattdeutsches Wörterbuch, Platgermana vortaro (en germana/platgermana), de Sass, ISBN 3-529-03000-7
- Plaŭtdiĉa lingvo
- tatoeba Multlingva frazaro kun multaj platgermanaj frazoj, 2012-07: 16000 platgermanaj frazoj.

Notoj

1. ↑ tia lingvo

	Lingvo
Listoj	Lingvistiko • Interlingvistiko • Planlingvo • Lingvaj familioj • Lingva filono • Senparenca lingvo
Diverslingve	alfabetorde • laŭ ISO 639 • laŭ familio • laŭ parolantaro • laŭ skribsistemo nombroj • Saluti • danki • idiotismo kaj idiotismaj esprimoj

Eksteraj ligiloj

- listego de ligiloj (http://www.plattmaster.de/links.htm#spraak) pri platdiĉa

- Pri Platgermana lingvo (http://www.ethnologue.org/show_language.asp?code=nds) en Ethnologue (angle)
- *Lengua alemana (http://www.proel.org/index.php?pagina=mundo/indoeuro/germanico/germanooc/aleman)* (Germana lingvo kaj ties dialektoj) en Promotora Española de Lingüística (http://www.proel.org/) (hispane)
- Lingva Mapo de Germanio, Nederlando, ktp (http://www.muturzikin.com/carteseurope/4.htm) (angle, france)
- Lingva Mapo de Germanio (http://www.proel.org/index.php?pagina=mundo/europa/alemania) (hispane)
- Serĉrezultoj (http://www.archive.org/search.php?query=low+saxon) de Rosetta Project (http://www.rosettaproject.org/)

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Platgermana_lingvo&oldid=5923998"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 11:07, 15 apr. 2016.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.